

La Letero al Diogneto

La fragmento de Kvadrato

el la Greka tradukitaj de Gerrit Isai Berveling

Enhavo:

Enkonduke de «Al Diogneto»

La Letero al Diogneto

La Fragmento de Kvadrato

Broŝurforme:

kiel: Voĉoj Kristanaj 4

unua eldono¹, VoKo, Vlaardingen 1981

dua eldono², korektita, VoKo, Vlaardingen 1986

tria eldono³, VoKo, Rijswijk 2020

Interrete:

La originala Greka teksto de «Al Diogneto»:

<https://www.ccel.org/l/lake/fathers/diognetus.htm>

Kvadrato (Eusebius, Hist. Eccl.):

<http://www.perseus.tufts.edu/hopper/text?doc=Perseus%3Atext%3a2008.01.0640>

Lastfoje kontrolitaj: 2020-04-20. La retpaĝo de www.ccel.org ne ĉiam alireblas.

¹ pseŭdonime: trad. Isai Sumber

² pseŭdonime: trad. Isai Sumber

³ planita

Enkonduke de «*Al Diogneto*»

En la jaro 1592 la eldonejo de l' fama humanisto-eldonisto Henriko Stefano liveris al la klera legantaro la unuan eblon, legi ĉi tiun *Al Diogneto*: kune kun *De Monarchia*, *Cohortatio ad Gentes*, *Expositio Fidei & Oratio ad Graecos*; ĉiuj ĉi estis editoritaj surbaze de unu kodekso el la 13a/14a jc., atribuanta ilin al Justino Martiro.

Depost tiam oni atingis unuanimecon almenaŭ negativan: *Al Diogneto* ne povas esti verkita de tiu Justino, kiu tiel neklasikan stilon montras en siaj ceteraj verkaĵoj – kontraste kun la klasikeco stila de tiu ĉi, dum ankaŭ ne estas tre verŝajne, ke li en tiel mallonga tempo tiel funde povus opiniŝanĝiĝi: ĉar enhance la diferencoj ne tre etas ...

Sed kiu do estas la (nun) anonima aŭtoro de ĉi apologio de la frua kristanismo? Kaj kiu povas esti tiu Diogneto, al kiu li (ŝi?) ĝin direktas?

Depost la 17a jc. oni menciis kiel eventualajn verkintojn ne malmultajn famulojn el plej diversaj epokoj: citeblas kiel tiaj i. a. Apolos (vidu 1 Kt 3:4), Klemento el Romo, Aristido, Marciono, ktp. Foje eĉ, plene forgesante, ke la kodekso ĝin koniginta devenas el la 13a/14a jc., iu hipotezis ĝin falsiĝo el la 15a jc.!

Teorio tre alloga, kvankam ne 100%e pruvebla, venas de P. Andriessen: li kombinas konatajn faktojn tiel. Certa Kvadrato verkis apologion de l' kristanismo en stilo, kiun laŭdis pluraj (i. a. Eŭsebio) kiel klasikan. Li atakis – laŭ la sciigoj – ne nur la Romian-Helenan religion, sed ankaŭ Judismon, precipe koncerne oferbuĉadon. Malsame ol liaepoka kutimo, li ne utiligis multajn mitologiaĵojn por – tiel mokante – ataki paganismon. Sian defendon li en Ateno prezentis al iu Cezaro, komence de la 2a jc.. Ĉio ĉi povus aplikiĝi je *Al Diogneto*: neniu detalo kontraŭas tion.

De Kvadrato restas al ni nur kelkaj linioj kun plena certeco. Eŭsebio, Hist. Ekl., IV, 3, 1-2, konservis ĝin⁴. – Sed, oni diros: tiuj linioj ne troviĝas

⁴ Vidu: La fragmento de Kvadrato.

en la teksto de *Al Diogneto*. Tiu konstato tamen ne multe pruvas, ĉar la sola kodekso konservinta ĉi apologian tekston por ni (ĉe brulo bedaŭrinde poste ankaŭ ĝi neniigis) jam enhavis la indikon, ke ĝi estas kopio de tute malnova kodekso kun – ĝuste pro sia aĝo – du lakunoj ... Kaj en la unua lakuno bone kongruus rakontado pri la mirakloj de Jesuo, pri ties pruvo (inkluzive la frazojn de Kvadrato) kaj fine pri la heroeco de la sekvantoj de Jesuo – eĉ ĝis en leonbuŝo! Tiam do refoje: nenia pruvo, sed ambaŭ Kvadrato kaj nia anonimulo povus esti identaj.

Kaj Diogneto? Kiu li?

Laŭ niaj fontoj, Imperiestro Marko Aŭrelio estis edukita «in Adriani gremio» (ĉe la sino de Hadriano)⁵, sed kiam Marko mem en siaj Pensadoj (la aŭtobiografio) rakontas pri sia eduko, inter la tuta aro da nomoj de li menciitaj mankas ... Hadriano, dum samloke legiĝas nomo de nekonata Diogneto! Se krome ni scias, ke jam en la jaro 112 Hadriano estis arĥonto de Ateno, titolo kun kiu ofte ligiĝis la indiko «Dinaskita» (kio estas ĝuste la senco de Diogneto), ni eble komprenas, kial P. Andriessen ĉi tion kombinante asertas, ke Diogneto envere estas Imperiestro Hadriano, al kiu – okaze de lia vizito al Ateno, por tie iniciĝi en la Eleŭzisaj Misteroj – direktis tiun ĉi apologion Kvadrato.

Tiel do solviĝus ambaŭ anonimecoj.

Ankaŭ aliarilate la teorio estas alloga: la teksto de *Al Diogneto* ja plurfoje parolas pri kono aŭ scio (kernvortoj de la misterokulto Eleŭzisa), dum krom tio estas konata la aserto de malnova historiisto, ke Kvadrato voĉlegis sian tekston por aŭdantaro da Kristanoj kaj Paganoj: «et audiebat unusquisque lingua sua illum loquentem» – ĉiu aŭdis lin paroli en sia propra lingvo, t. e. ke liaj paroloj havis fundan signifon kaj sencon por ambaŭ grupoj. Kristanoj kompreneble komprenis ĝin kristane, sed enestas tiom da terminoj sed ankaŭ enhavo, memoriganta pri la misterokulto, ke ĵus iniciĝintoj tion tuj perceptus: puriĝo, vidi la misterojn, vidi Dion, ktp.

⁵ Vita M. Antonii, IV, 1.

Resume: ni povas diri ke *Al Diogneto* datiĝas de la unua kvarono de la 2a jc., – ke probable ĝi estis verkita en Ateno por prezentado al Cezaro Hadriano, – ke eble Kvadrato estas la anonima aŭtoro kiu verkis ĉi liniojn, kiuj prave famiĝis kiel unu el la perloj de l' Prakristanismo.

Kaj ni nunuloj? Ĉu valoras por ni legi tekstojn tiel malnovajn? Laŭ mia firma konvinko: certe. Ni nunuloj iom pli funde ekkonu la radikojn – kaj Judajn kaj nejudajn – de «nia» religio. Ekzemple kio estas dirita en X:6: fariĝi Dio por la aliaj ... ĉu ne ĝuste en tio kuŝas la kerno de la prakristana elano? – Kaj samtempe «surpreni sur sin la ŝarĝojn de la proksimuloj» estas «vivi en la ĉielo» (X:7). Aŭ ĉu mi ne bone interpretas?

Kaj lia interpreto de la rakonto Biblia pri la paradizo de plezuro (Eden signifas «plezuro», Gen 2:8) nin povas trafi kvazaŭ tre moderna ekzegezo: XII:1 k. s.: ni *mem* devas fariĝi tia Ĝardeno de Plezuro, kaj en ni kresku ambaŭ la famaj arboj: tiu de la scio kaj tiu de la vivo. Unu estas nedisigebla de la alia ...

Gerrit Isai Berveling

La Letero al Diogneto

Πρὸς Διόγνητον Ἐπιστολή

Enkonduko

1:1 Ĉar mi vidas, ho plej eminenta Diogneto, ke ege vi klopodas por ekkoni la religion de la Kristanoj kaj por tre funde kaj ekzakte ekscii pri ili: al kiu Dio ili fidas kaj pro kiu kulto al Li ili ĉiuj malestimas la mondon kaj malŝatas la morton kaj kial ili opinias ke ne estas Dioj, kiujn la Grekoj opinias tiaj, kaj kial ili ne gardas la superstiĉon de la Judoj, kaj kian tenerecon ili havas reciproke inter si, kaj kial, fine, tiu ĉi genro aŭ vivstilo nova envenis en la vivon ĵus nun kaj ne pli frue: mi laŭdas tiun vian deziron kaj mi demandas Dion, kiu donas al ni kaj la parolon kaj la aŭdon, ke estu donite al mi, tiel paroli ke vi aŭskultante pliboniĝu, kaj al vi, tiel aŭskulti ke ne tristiĝu la parolanto.

Refute de la idolkulto

2:1 Nu do, purigu vin mem de ĉiuj pensoj, kiuj la menson antaŭe jam ligas, kaj senigu vin de la kutimo, kiu vin blindigas, kaj fariĝu – kiel origine – nova homo, por ke ankaŭ novan parolon (kiel ankaŭ vi mem ĝin titolas) vi aŭskultu; rigardu ne nur per la okuloj, sed ankaŭ per la intelekto: el kiu substanco aŭ el kiu formo konsistas tiuj, kiujn vi nomas kaj opinias Dioj? 2 Ĉu la unua ne estas ŝtono, same kiel la pavimo surtretata, kaj alia – bronzo, ne pli bonkvalita ol la bronzaĵoj por nia ĉiutaga uzado, kaj tiu – ligno, eĉ jam putriĝanta, kaj jena – arĝento, bezonanta homon por prigardado, ke oni ĝin ne ŝtelu, kaj jena – fero, rustiĝinta, kaj jena ĉi – peco da argilaĵo, neniom pli valora ol tio, kion ni uzas por la plej hontinda servo? 3 Ĉu ĉio ĉi ne estas el materio pasema?

Ĉu ne forĝita per martelo kaj fajro? Ĉu ilin ne faris skulptisto, forĝisto, arĝentisto aŭ ceramikisto? Kaj antaŭ ol per ties artoscio ili estis modlitaj al sia nuna formo, ĉu ne ĉiu el ili estis – samkiel ankoraŭ nun! – transformebla al io alia? Kaj la vazoj kiujn ni nun posedas el la sama materio, ĉu – se la samajn fakolujn ili trafus – tiuj ne povus fariĝi similaj al ili? 4 Kaj inverse, kion nun vi adoras, ĉu tion la homoj ne povus similigi al la ceteraĵoj? Ĉu ne ĉio ĉi sensensas? Ĉu ne blindas? Ĉu ne senaminas? Ĉu ne senperceptas? Ĉu ne senmovas? Ĉu ne ĉio ĉi putriĝas? Ĉu ne ĉio ĉi neniĝas? 5 Kaj tion vi nomas Dioj! Al tiuj vi sklavas, tiujn vi adoras, kaj al tiuj finfine vi similiĝos! 6 Kaj pro tio vi malamas la Kristanojn, ĉar tiujn ili ne opinias Dioj. 7 Sed ja, ĝuste dum vi opinias honori kaj kredi je ili, – ĉu vi ne multe pli malestimas ilin? ĉu vi ne multe pli mokas kaj insultas ilin, se la ŝtonajn kaj ceramikajn vi adoras sen ke iu ilin gardas, dum la arĝentajn kaj orajn nokte vi enŝlosas kaj dumtage per gardistoj ĉirkaŭas, por ke tiujn oni ne ŝtelu? – 8 Kaj la holokaŭstoj⁶ kaj incenso, per kiuj vi kredas honori ilin ...! Se ili perceptas, vi per tio ilin punas; sed se ili ne perceptas, nu – vi adoras ilin ja insultante per sango kaj haladzo! 9 Iu ajn el vi foje provu elteni tion, suferu iu ajn ke tio estu farita al li! – Ne, neniu homo libervole suferos tian punon, ĉar li havas ja sensojn kaj intelekton; sed ŝtono ĝin eltenas, ja ĝi sensensas. Ĝiajn sensojn vi do punas. 10 Pri tio, ke la Kristanoj ne sklaviĝas al tiaj Dioj, multon mi povus ankoraŭ diri; sed se iu ne opinius sufiĉa la diritan, mi kredus sensenca pluparoli.

Refuto de la Judismo

3:1 Mi supozas, ke post tio ĉi vi precipe deziras aŭskulti, kial ili adoras Dion ne samkiel la Judoj. 2 Nu, se la Judoj sindetenas de la ĵus menciita idoladoro kaj kultas nur unu Dion de la universo kaj kredas Lin Sinjoro, prave ili opinias tion ĝusta; sed se ili donas al Li sian kultadon sammaniere kiel per la ĵusdiritaĵoj, ili eraras. 3 Ĉar se la Grekoj pravas sian malsaĝon, oferante al <Dioj> senperceptaj kaj surdaj, tiuj ĉi, juĝante ke ili havigas ĝin al Dio, kvazaŭ Li bezonus ĝin, konsideru ĝin prefere stultaĵo ol Di-kultado. 4 Ĉar «kiu kreis la ĉielon kaj la teron kaj ĉion en

⁶ holokaŭstoj (= bruloferoj) de buĉitaj bestoj.

ili»⁷ kaj kiu al ni ĉiuj donacas tion, kion ni bezonas, tiu ja ne bezonas ion ajn el tio, kion Li mem havigas al kiuj opinias doni ĝin. 5 Sed kiuj opinias oferi al Li per sango kaj halazdo kaj bruloferoj kaj kiuj honoras Lin per tiaj honoroj, laŭ mi neniom diferencas de tiuj, kiuj la saman honoradon plenumas por surdaĵoj: ĉar tiuj donas al kiuj ne povas ricevi la honoron, dum ĉi tiuj opinias havigi ĝin al kiu nenion bezonas.

Senutileco de la Judaj kutimoj

4:1 Cetere, iliajn skrupulojn pri manĝaĵoj kaj ilian superstiĉon pri sabatoj kaj ilian orgojlon pri la cirkumcido kaj la ŝajnigon pri fastoj kaj novlunoj – ridindajn ja kaj ne priparolindajn! – mi opinias, ke vi ne bezonas ekscii tiujn de mi. 2 Ĉar kiel ne estus malpie, akcepti kelkajn el la de Dio por homa utilo kreitaj aferoj kiel bone kreitajn, sed forĵeti aliajn kiel senutilajn kaj superfluajn? 3 Kiel estus ne sakrilegie, mensogi pri Dio, kvazaŭ Li malpermesus sabate fari ion bonan? 4 Kiel ne meritis mokojn, orgojli pri mutilo de la karno kvazaŭ pri signo de elektiĝo⁸, kvazaŭ pro tio ili estus speciale amataj de Dio? 5 Kaj ke daŭre ili sekvas la stelojn kaj la lunon por percepti monatojn kaj tagojn, kaj ke ili analizas la gvidadon de Dio kaj la alternojn de la sorto laŭ *ties* moviĝoj – kelkaj kiel instigo al festado, aliaj por lukto: kiu prenus tion kiel signon de pieco kaj ne prefere de stulteco? 6 Jen mi do supozas, ke sufiĉe vi sciiĝis, kiel prave ne nur de la ĝeneralaj vaneco kaj trompo, sed ankaŭ de la subtilemo kaj de la orgojlo de la Judoj sindetenas la Kristanoj. Sed la misteron de ilia propra religio, – vi ne esperu ke vi ĝin povos ekscii de ajna homo ...

Paradoksoj kristanaj

5:1 Ĉar la Kristanoj nek teritorie nek lingve nek more distingiĝas disde la ceteraj homoj; 2 ĉar ili nek proprajn urbojn enloĝas, nek lingvaĵon fremdan uzas, nek vivon okulfrape alian vivas. 3 Ne ja per talento aŭ spekulacio de homoj subtilemaj estis eltrovita por ili ĉi tiu doktrino, kaj ili ankaŭ ne konfesas iun dogmon homfaritan, kiel faras kelkaj aliaj.

⁷ Eliro 20:11; Agoj 14:16.

⁸ La cirkumcidon malpemis ĝuste Hadriano tial ĉar ĝi estas mutilo de la korpo.

4 Sed loĝante urbojn Helenajn kaj barbarajn, ĉiu laŭ sia sorto, kaj obeante la enlandajn kutimojn relate al vestaĵo, manĝaĵo, ktp, ili montras mirindan kaj komunopinie paradoksan konduton civitan: 5 ili loĝas siajn proprajn patriojn, sed kvazaŭ eksterlandanoj; ili partoprenas en ĉio kiel civitanoj, – kaj simple ĉion toleras kvazaŭ fremduloj; ĉio fremda estas por ili patrio, kaj la patrio – io fremda. 6 Ili geedziĝas kiel ĉiuj, ili infangeneras; sed la generitan ili ne elmetas. 7 Sian tablon ili komunigas kun aliaj, sed ne sian liton. 8 En la karno ili estas, sed ili ne vivas laŭ la karno⁹. 9 Surtere ili sian tempon pasigas, sed enĉiele ili havas civitanecon. 10 Ili obeas la fiksitajn leĝojn kaj per sia vivostilo ili superas la leĝojn. 11 Ĉiujn ili amas, kaj de ĉiuj ili estas persekutataj. 12 Ne konas oni ilin, kaj ilin kondamnas¹⁰; oni mortigas ilin, kaj ili viviĝas. 13 «Ili almozpetas kaj riĉigas multajn»¹¹; ĉion ili malhavas, kaj je ĉio ili riĉegas. 14 Oni malhonoras ilin, kaj en la malhonoroj ili gloras. Oni insultas ilin, kaj oni opinias ilin justaj. 15 «Oni mokinsultas ilin kaj ili benas»¹²; oni mistraktas ilin kaj ili honoras. 16 Bonfarante, ili estas punataj kiel aĉuloj; punate, ili ĝojas kvazaŭ oni donus al ili la vivon. 17 La Judoj ilin atakas – kvazaŭ aligentanojn, kaj la Helenoj persekutas ilin. Kaj kiuj malamas ilin, tiuj ne povas diri la kialon de sia malamo.

La Kristanaro kiel «animo de la mondo»

6:1 Por diri simple: kio estas la animo en la korpo, tio estas la Kristanoj en la mondo. 2 La animo estas dividita tra ĉiuj membroj de la korpo, kaj la Kristanoj tra ĉiuj urboj de la mondo. 3 La animo loĝas en la korpo, sed ne estas el la korpo; kaj la Kristanoj loĝas en la mondo, sed ne estas el la mondo. 4 La nevidebla animo estas gardata en la korpo videbla; kaj la Kristanojn oni konas kiel estantajn en ĉi mondo, sed ilia religio restas nevidebla. 5 La karno malamas la animon kaj militas je ĝi, kvankam nenion ĝi suferis de ĝi, nur ĉar ĝi prohibas uzi la ĝuojn; la mondo same malamas la Kristanojn, kvankam ĝi nenion suferis de ili, – nur ĉar ili

⁹ = ne laŭ homa kutimo.

¹⁰ Vidu en Tertuliano – Apologio, ĉap. 1.

¹¹ 2 Korintanoj 6:10.

¹² 1 Korintanoj 4:12.

kontraŭas la ĝuojn. 6 La animo amas la malamantajn karnon kaj membrojn; ankaŭ la Kristanoj amas la malamantojn. 7 La animo estas enŝlosita en la korpo, sed ĝi kun-tenas la korpon; ankaŭ la Kristanoj estas tenataj en la mondo kvazaŭ en karceron, sed ili kun-tenas la mondon. 8 La senmorta animo loĝas en sia mortema tendo; ankaŭ la Kristanoj fremdule loĝas en la pereonta, sed ili atendas la nepereontan en la ĉieloj. 9 Mistraktate de manĝoj kaj drinkado, la animo tamen progresas; ankaŭ la Kristanoj, ĉiutage punate, plu plinombriĝas. 10 Sur tian postenon lokis ilin Dio, kaj ili ne rajtas forlasi ĝin.

Dia origino de la Kristanismo

7:1 Ĉar, kiel mi jam diris, tio ĉi estis transdonita al ili ne kiel homa inventaĵo, kaj ili ankaŭ ne trovis iun ajn homfaritan ideon inda je tiel profunda obeo, kaj oni ankaŭ ne konfidis al ili la administradon de terecaj misteroj. 2 Sed kiu envere estas la ĉioreganta kaj ĉiokreinta kaj nevidebla Dio, tiu do el la ĉieloj enmetis en la homojn la veron kaj sian parolon sanktan kaj ne ĝisfunde kompreneblan, kaj Li firmigis ĝin en iliaj koroj; ne, kiel iu eventuale povus pensi, ke Li sendis al la homoj iun sian servanton aŭ anĝelon aŭ princon aŭ iun ajn el la regantoj de ĉi mondo aŭ iun el tiuj, kiuj prizorgas la administradon en la ĉieloj, sed la Artiston mem, la kreinton de la tuto, per kiu Li kreis la ĉielojn, per kiu Li limigis la maron en propraj limoj: tiun do, kies misteron fidele gardas ĉiuj elementoj, de kiu la suno ricevis por obei la mezurojn de la tagaj vojoj, al kiu pretas obei la luno por – laŭordone – nokte lumi, al kiu emas sekvi la steloj, la ĉeularo de la luno en ties vojaĝo; – de kiu ĉio estis ordigita, difinita kaj submetita: la ĉieloj kaj ĉio en la ĉieloj, la tero kaj ĉio sur la tero, la maro kaj ĉio en la maro, la fajro, la aero, la abismo, ĉio en la altoj, ĉio en la profundoj, ĉio inter ambaŭ: tiun do Li sendis al ili. 3 Ĉu eble, kiel nun povus supozi iu: ĉu por esti tirano, por timigi, por mirigi ilin? 4 Tute ne! Sed en dolĉeco kaj mildo Li sendis lin, kiel reĝo sendanta sian reĝan filon, Li sendis lin al la homoj kiel <...>, Li sendis lin, kiel sendas savanto, kiel sendas konvinkanto, ne kiel iu, kiu devigas, ne kiel persekutanto; Li sendis kiel amanto, ne kiel juĝanto. 6 *Lin* Li ja re-sendos por juĝi: kaj kiu tiam kontraŭstaros lian Venon?

<unua lakuno>

7 <Ĉu vi ne vidas> ilin antaŭmetitaj al la sovaĝaj bestoj, por ke la Sinjoron ili negu, sed tamen ili restas nevenkeblaj? 8 Ĉu vi ne vidas: ju pli ili estas punbatataj, des pli nombriĝas la novuloj!¹³ 9 Tion vi ne kredu verko de homo: tio ja estas povo de Dio: tio estas signo de lia Veni.

Dio manifestita en la enkarniĝo

8:1 Ĉar kiu de la homoj tutplene sciis, *kio* do vere estas Dio, antaŭ ol *li* venis? 2 Aŭ ĉu vi akceptas la vanajn kaj stultajn dirojn de tiuj «fidindaj» filozofoj, el kiuj kelkaj nomas la fajron Dio (tien ili mem devus iri, ĉar ĝin ili titolas Dio!), aliaj la akvon, refoje aliaj iun alian el la elementoj kreitaj de Dio!? 3 Sendube ja: se iu el ĉi tezoj estus akceptebla, – kiu ajn de la ceteraj kreaĵoj povus same bone montriĝi esti Dio! 4 Sed ĉi tio estas nuraj mirrakontoj kaj trompo fare de malveristoj. 5 Neniu homo vidis aŭ ekkonis Dion, sed mem Li sin konigis. 6 Sed Li sin konigis per la fido, kiu estas la nura, per kiu eblas vidi Dion. 7 Ĉar la sinjoro kaj kreinto de la universo, Dio, kiu faris ĉion kaj laŭorde dismetis, ne nur montriĝis homama sed ankaŭ indulgema. 8 Sed envere Li ĉiam estis tia, kaj estas, kaj estos – bonkora, kaj bona, kaj ne koleriĝema, kaj Li sola estas bona.

9 Elpensinte grandan kaj neeldireblan intencon, Li komunikigis ĝin nur al sia filo. 10 Nu do, dum Li tenis ĝin sub sekreto kaj kaŝis sian saĝan planon, ŝajne Li nek zorgis nek pensis pri ni; 11 sed kiam Li malkaŝis ĝin per sia amata filo kaj manifestis ĉion, kion dekomence Li preparis, samtempe ĉion Li donis al ni: ne nur ke ni partoprenu je liaj bonfaroj, sed ankaŭ ke ni vidu kaj konu Lin: kaj kiu el ni iam ajn povis esperi tion?

¹³ Tertuliano – Apologio 49:13: semo estas la sango de kristanoj!

Kiamaniere Dio antaŭdestinis ĉion

9:1 Ĉion do jam anticipu fiksite ĉe si mem, kune kun sia filo, ĝis antaŭ tre mallonge Li lasis nin drivi, laŭ nia deziro, je senordaj impulsoj, direktatajn de ĝuoj kaj deziroj. Li tute ne trovis plezuron en niaj pekoj, sed suferis ilin, ankaŭ ne aprobis tiun tempon de maljusteco, sed preparis la nunan justecon, por ke, tiutempe per niaj propraj agoj pruvite malindaj je vivo, ni nun fariĝu indaj pro la mildeco de Dio, kaj por ke, post kiam montriĝis maleble propramove eniri la regnon de Dio, per la forto de Dio ni ricevu la eblon eniri. 2 Kaj kiam pleniĝis nia maljusteco kaj plene videbliĝis, ke kiel ties sola repago estas atendeblaj puno kaj morto, jen venis la momento, kiun antaŭfiksis Dio por plue videbligi al ni Lian bonkorecon kaj forton (ho, la grandioza homamo kaj bonvolemo de Dio!), kaj Li nek malamamis nin nek forpuŝis nin, nek memortenis nian malbonon, sed Li indulgis, Li eltenis nin, – kaj pro kompatemo Li mem surpronis niajn pekojn, Li mem «forferis sian propran filon» kiel elaçeton pro ni: la sanktan pro pekuloj, la senkulpan pro kulpuloj, «la justan pro maljustaj»¹⁴, la nepereontan pro pereemaj, la senmortan pro mortidevaj. 3 Ĉar kio alia kapablus kovri niajn pekojn, krom Lia justeco? 4 Per kiu alia ni povus justiĝi – ni senjustaj kaj malpiaj – krom per la unika Filo de Dio? 5 Ho dolĉa interŝanĝo! Ho nekomprenebla verko! Ho neatenditaj bonfaroj! Ke maljusteco de multaj kovriĝu dank' al unusola justulo! Ke la justeco de unusola justigus multajn maljustajn!

6 Ĉar Dio konvinkis nin en la pasinteco, ke neblas, ke nia naturo atingu la vivon, kaj ĉar Li indikis la savanton, kiu povas savi eĉ la neblaĵon, Li do esperis, ke pro ambaŭ ĉi faktoj ni fidu je Lia boneco, ke ni rigardu Lin nia subtenanto, nia Patro, instruisto, konsilanto, kuracisto, intelekto, lumo, honoro, gloro, forto kaj vivo, kaj ke ni ne zorgu pri vestaĵoj aŭ pri manĝaĵoj.

¹⁴Romanoj 8:32; 1 Petro 3:18.

La amo: esenco de la nova religio

10:1 Se ankaŭ vi nun ekdeziras tian fidon, unue do vi ricevu konon pri la Patro. 2 Ĉar Dio la homojn amis; pro ili Li kreis la mondon; al ili Li donis la parolon, la intelekton; Li permesis ilin suprenrigardi al Li; Li formis ilin laŭ Sia bildo; Li «sendis al ili sian unikan filon»¹⁵; Li promesis al ili la Regnon el la ĉielo, kiun Li donos al ĉiuj, kiuj Lin amas.

3 Ĉar nun vi konas Lin, – per kiu graco vi pensas, ke vi pleniĝos? Kiamaniere vi re-amos Lin, kiu unua vin tiom amis? 4 Amante, vi estos imitanto de lia boneco. Kaj ne miru, ke homo povas esti imitanto de Dio; se Dio ĝin volas, la homo povas. 5 Ĉar nek subpremado de la proksimuloj nek la deziro superi la malpli fortajn, nek riĉeco, nek perforto al senhavuloj estas la feliĉo: – tiamaniere ne eblas imiti Dion, sed ĉio ĉi kuŝas ekster lia grandiozeco.

6 Sed kiu surprenas sur sin la ŝarĝon de la proksimulo; kiu pretas bonfari al sia malsuperulo ĝuste tiutere kie li mem estas supera; kiu fariĝas Dio por la ricevantoj, disponigante al la bezonantoj tion, kion li mem posedas kiel Di-donitaĵon: tiu ja estas imitanto de Dio.

7 Tiam, ankoraŭ estante surtere, vi vidos, ke Dio reĝas en la ĉielo: tiam vi komencos paroli la misterojn de Dio: tiam vi amos kaj samtempe admiros tiujn, kiuj kondamniĝis pro la negado nei Dion: tiam vi klare perceptos la sintrompon kaj la devojiĝon de la mondo, kiam vi ekkonos, kio estas vere vivi en la ĉielo; kiam vi malŝatos, kio tie ĉi estas konsiderata kiel morto; kiam vi timos, kio ververe estas la morto kiu atendas tiujn, kiuj estas kondamnitaj en la fajron eternan, kiu turmentos tiujn, kiuj estos transdonitaj al ĝi, ĝis la fino. 8 Kiam vi konos tiun fajron, vi admiros kaj benos tiujn, kiuj pro la justeco eltenas la fajron paseman.

<dua lakuno>

¹⁵ 1 Johano 4:9.

Epilogo

11:1 Mi ne parolas fremdaĵojn nek serĉas absurdon, sed estinte lernanto de la apostoloj mi nun mem fariĝas instruanto de la popoloj; mi nur transdonas la konfidentaĵon al tiuj, kiuj fariĝis indaj lernantoj de la vero. 2 Ĉar estante ĝuste instruita kaj generita de la parolo¹⁶ bonvola, – kiu ne ekdezirus funde lerni tion, kio per la Parolo estis montrita al la lernantoj? Por tiuj plene klariĝis la parolo ĉe sia apero, senkaŝe parolante. Nekomprenite de la nekredantoj, li rakontadis al la lernantoj, kiuj, de li rekonitaj kiel fidelaj, ekkonis la misterojn de la Patro. 3 Por tio Dio sendis la parolon, ke li klariĝu al la mondo.

De sia propra gento li estis nehonorata, de la apostoloj li estis predikata, de la popoloj kredata. 4 Li, kiu estas de la komenco, kiu aperis nova kaj montriĝis praa kaj kiu ĉiam refoje naskiĝas nova en la koroj de la sanktuloj. 5 Li, kiu ĉiam, kiu hodiaŭ estas rekonata kiel Filo, dank' al kiu riĉiĝas la eklezio kaj abundiĝas la graco, disvolviĝante, en la sanktuloj; graco kiu liveras intelekton, klarigas misterojn, anoncas la decidajn momentojn, ĝojas pri la fidelaj, kiu sin donas al la serĉantoj, kiuj ne rompas la ligojn de la fido nek transpaŝas la limojn de la patroj. 6 Respekton por la Leĝo oni prihimnas, la gracon de la profetoj rekonas, kaj oni fortigas la fidon je la evangelioj, gardas la tradicion de la apostoloj, – kaj la graco de la eklezio saltedancas!

7 Se tiun gracon vi ne tristigas, vi ekscios, kion parolas la parolo – tra tiuj, kiujn li volas, kaj kiam li volas. 8 Ĉar ĉiufoje, kiam pro la volo de la ordonanta parolo ni instigiĝas ion pene klarigadi, ni komuniĝis al vi pere de la amo je tio, kio estis rivelita al ni.

12:1 Se tion ĉi vi ĉeestis kaj aŭskultis kun atento, vi scios, kiom donas Dio al tiuj, kiuj Lin amas lojale, kiuj – por tiel diri – fariĝas paradizo de plezuro, kiuj kreskigas en si mem multfloran arbon belburĝonan, mem ornamite de bunteco fruktara. 2 Ĉar tie ĉi estis plantita la arbo de la scio kaj la arbo de la vivo; sed ne la arbo de la scio mortigas, sed mortigas la

¹⁶ «parolo» fariĝas kvazaŭ centra termino: oni memortenu, ke Jesuon oni titolis la Parolo de Dio.

malobeo. 3 Ĉar ne sen subsignifo estas la skribitaĵo, ke «en la komenco arbon de la scio kaj arbon de la vivo Dio plantis meze de la paradizo»¹⁷; tio al ni montras la vivon tra la scio; sed kiam la homoj de la komenco ĝin uzis ne prave, ili estis nudaj pro la trompo de la serpento. 4 Ĉar ne ekzistas vivo sen scio, nek sekura scio sen vera vivo: tial ambaŭ estis plantitaj tiel apude. 5 Nu, tiun ĉi sencon komprenante, sed mallaŭdante tiun scion, kiu sen ordono de la vero strebas al la vivo, diras la apostolo: «la scio bloveŝveligas, sed la amo edifas»¹⁸. 6 Ĉar kiu opinias ion scii – sen vera scio priatestata de la vivo –, tiu ne havas scion, sed estas trompata de la serpento, ĉar li ne amis la vivon. Sed kiu kun timo ekscias kaj restas serĉanta la vivon, tiu estas plantita en espero kaj atendas frukton. 7 Nu jen: koro estas scio; kaj la vivo – la vera Parolo, se komprenata. 8 Se ties arbo kreskas kaj fruktigas, vi ĉiam plukos tion, kio estas agrabla antaŭ Dio, kion nek serpento povas tuŝi nek trompo enŝteliĝas; kaj Eva ne neniigis <tiam>, sed ŝin oni kredas virgulino; 9 kaj la saviĝo estas montrata, kaj la apostoloj fariĝas saĝuloj, kaj la Pasko de la Sinjoro proksimiĝas, kaj vaks-torĉoj alportiĝas kaj okazas la nupto kun la mondo, kaj dum ankoraŭ la sanktulojn li instruas, la Parolo plenĝojiĝas, – en kiu gloriĝas la Patro.

Al Li estu la gloro en la tempegojn.

Amen.

¹⁷ Genezo 2:9.

¹⁸ 1 Korintanoj 8:1. Alia traduko: La scio kondukas al sin-gravigo, sed la amo edifas.

La Fragmento de Kvadrato

Λόγιον του Κοδράτου

Eŭsebio – Historio Eklezia, IV, 3, 1-2:

<1> Post kiam Trajano regis plenajn dudek jarojn minus ses monatoj, Elio Hadriano transprenis la hegemonion. Al li direktis paroladon Kvadrato, kiu faris ĉi apologion de nia religio, ĉar kelkaj fiuloj provis ĝeni la niajn; ankoraŭ nun ekzistas ĉe pluraj el niaj fratoj – kaj ankaŭ ĉe ni – ties teksto; el ĝi eblas vidi la brilajn pruvojn de lia intelekto <2> kaj de lia apostola ortodokseco.

Mem li montras sian praecon per tio kion li diras propraparole: «sed la faroj de nia Savinto ĉiam ĉeestis, ili ja estis realaj: la sanigitoj, la resurektintoj el inter la mortintoj, kiujn oni ne nur vidis sanigitaj aŭ resurektintaj, sed ili ankaŭ ĉiam ĉeestis, ne nur dum la Savanto ankoraŭ estis inter ni, sed ankaŭ ankoraŭ iom da tempo post lia forpaso, tiel ke kelkaj el ili eĉ pluvivas ĝis nia propra tempo».
